## Urseto






Urseto el pluŝo
sin lavis sub duŝo,
ĝi ĝuis ŝprucadon
kaj kantis baladon.

## Kandelo



Saltetis kateto
de breto al breto,
faligis kandelon,
brulvundis orelon.



## Vulpo

La vulpo kaŝe paŝas,
kokidojn etajn ĉasas.
Forpelis ĝin fidela
hundeto grizafela.



## Boleto

Havas boleto ĉapelon
klinitan sur unu orelon,
kaj estas tiu boleto
plej eleganta fungeto.

